# *Díaz-Canel ?eestas la ceremonion por premii kubajn kamparanojn*



**Foto: Heriberto González Brito. Trabajadores**

Havano,  maj 14 (RHK) Kun la ?eesto de la unua sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Kubo (CC PCC) kaj prezidento de la Respubliko, Miguel Díaz-Canel, la  Nacia Asocio de Malgrandaj Farmistoj (ANAP)  rekonis tiujn, kiuj anta? la sennombraj defioj alfrontataj de la kuba kamparanaro, da?rigas en la nobla tasko produkti nutra?ojn kaj kontribui al la disvolvi?o de la lando.

Dum la ceremonio, okazinta en la Protokola Salono de El Laguito, la kuba prezidento donis la honoran titolon de Heroo de la Laboro de la Respubliko de Kubo al José Alberto González Sánchez, kaj la Ordenon de la 17-a de majo al ses kamparanoj kun granda sperto en la agrikultura produktado.

Akompanante la ?tatestron, la Komandanto de la Ribela Armeo José Ramón Machado Ventura; la membroj de la Politika Buroo Roberto Morales Ojeda, Sekretario de Organizo de la CC PCC; Félix Duarte Ortega, prezidanto de la ANAP; Teresa Amarelle Boué, ?enerala sekretario de la Federacio de Kubaj Virinoj, kaj Ulises Guilarte de Nacimiento, ?enerala sekretario de la Kuba Laborista Centralo.

Al la aran?o ?eestis anka? José Ramón Monteagudo Ruiz, membro de la Sekretariejo kaj estro de la Fako pri Agronutrado ?e la CC PCC, kaj Gerardo Hernández Nordelo, Heroo de la Kuba Respubliko kaj Nacia Kunordiganto de la Komitatoj por la Defendo de la Revolucio. .

La aktivado estas parto de la festotago okaze de la memorfesto en Kubo de la Tago de la Kamparano, la venontan 17an de majo, kiam Kubo festas 65 jarojn de la subskribo de la Le?o pri Agrara Reformado fare  de ?efkomandanto Fidel Castro Ruz, kaj 63 jarojn de la fondo de la asocio de etaj agrikulturistoj (ANAP).

Fonto: ACN/Granma

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/354665-diaz-canel-ceestas-la-ceremonion-por-premii-kubajn-kamparanojn

**Radio Habana Cuba**